NUMERO 7

ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org

18 SEP 2017

# NORDA ✫ KURIERO

## La kursoj rekomenciĝas en norda Francio



Niaj kluboj organizas dumjarajn, ĉiusemajnajn kursojn de Esperanto, kiuj rekomenciĝos en septembro aŭ oktobro.

**Bersée:**
Lunde Claude Longue-Épée instruas al progresantoj gvidante konversacian rondon.

**Lillo:**
Marde ekde la 3ª de oktobro Katja Boen instruos en du kursoj: unuagrada je la 18:00 kaj duagrada je la 19:15, en *Maison régionale de l'environnement et des solidarités* (MRES, 23 rue Gosselet).

Vendrede matene ekde oktobro Michel Dechy instruos en *Université du temps libre*.

**Villeneuve-d'Ascq:**
Marde ekde la 17ª de oktobro Michel Dechy instruos de la 18:00 ĝis la 19:45 en la Lilla Universitato (Pont-de-Bois) por komencantoj. Li planas gvidi ankaŭ kurson por progresantoj ĉiun duan lundon laŭpete.

Bedaŭrinde ne eblas por la redakcio indiki kursojn en aliaj kluboj pro manko de informoj.

Ni deziras al ĉiuj lernantoj sukceson kaj plezuron dum iliaj kursoj!

## Ne okazos la Eŭropa Rendevuo de Stella

Ĉi-jare pro organiza problemo ne povos okazi la Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage. La Federacio diskutos pri organizado de la venonta Rendevuo.

Ĉu ankaŭ vi deziras iel helpi al la preparado? Jesokaze, kontaktu Roch Jullien per retletero al: roch.jullien@esperanto-arras.fr!



# Rainer Kurz prelegos pri rifuĝintoj

La germano Rainer Kurz prelegos **mardon la 26$^{an}$ de septembro** je la 19:00 en MRES en Lillo (23 rue Gosselet) pri sia iniciato “Laboro por Rifuĝintoj”. Tiu iama prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio strebas por trovi dungadon por akademiaj rifuĝintoj en Germanio kaj Aŭstralio. Tion li klarigos, post prezento de la situacio de la rifuĝintoj en Eŭropo.

La prelego estos malfermita al la ne-esperantistoj. Ĝin sekvos laŭvola komuna manĝo en proksima restoracio.

Mardon matene Rainer Kurz vizitos Lillon sub la gvido de Claude Longue-Épée kun pluraj lillanoj. Vi povos partopreni rendevuante je la 9:00 antaŭ la stacidomo Lille-Flandres.



# Aŭdiĝis Esperanto en la Lilla stratbazaro!



Denove, dank’ al Vincent Peingnez, staris stando de la Lilla Esperanto-klubo en la Lilla granda stratbazaro de sabato la 2$^{a}$ ĝis dimanĉo la 3$^{a}$ de septembro! Vincent, Michel Dechy, Xavier Dewidehem kaj aliaj lillanoj informis pri la lingvo kaj la baldaŭaj kursoj al la vizitantoj de tiu tre ampleksa popola evento. Kaj ili jam pensas pri la venontjara Lilla stratbazaro…!

Pli poste, dimanĉon la 10$^{an}$ de septembro Michel kaj Vincent deĵoris ankaŭ en la foiro de asocioj de la urbo Villeneuve-d’Ascq ĉe Lillo.

# Valencieno frandis en Esperanto

Sabaton la 3$^{an}$ de junio okazis la jara renkontiĝo de la Valenciena Esperanto-klubo. Kvankam la grupo de la belga, najbara urbo Solre-sur-Sambre estis malfondita en majo 2015, kvin eksmembroj partoprenis al tiu kunveno. Entute ĉeestis dudeko da geamideanoj, kiuj pasigis tre agrablan momenton en la restoracio *Le Viennois* en Coulsolre (inter Maubeuge kaj Beaumont) kaj en la muzeo pri vitro t.n. *MusVerre* en Sars-Poteries.



# Sukcesis la ĉi-jaraj ekzameniĝintoj

Jam de pluraj jaroj, escepte en 2015 pro la Universala Kongreso en Lillo, fine de la printempo aŭ komence de la somero okazas ekzamensesio de la Franca Esperanto-Instituto en la asocia domo MRES de Lillo.




La 10an de junio 2017 kvar kuraĝuloj: unu kandidato Joël Boucquie unuagrade kaj tri kandidatoj Dorine Francheteau, Pierre Dufour kaj Vincent Morel duagrade, frontis la laboron kaj brile sukcesis sian ekzamenon.

Varmajn gratulojn al ĉiuj kaj dankon al Katja Boen kaj Michel Dechy, kiuj respondecis pri tiu sesio! Ili poste frandis kukojn kaj cidron por festi la finon de la lernjaro.

Okazos en la pariza sidejo de Esperanto-France la triagrada FEI-ekzamensesio sabaton la 14an kaj dimanĉon la 15an de oktobro.

# Promeno en la Flandraj Ardenoj



Dimanĉon la 30an de aprilo ni vizitis kiel ĉiujare niajn belgajn geamikojn okaze de la Tago de la Flandraj Ardenoj. Ĉi-jare ni faris matenan marŝadon tra la naturo en Louise-Marie (orienta Flandrio). Ŝajne la vetero favoris al ni. Ni ĝuis panoramon de la flandra naturo, en kiu facile intermiksiĝas zoologiaj, botanikaj kaj historiaj detaloj.

La historio de la grundo kaj ĝiaj tavoloj klarigas la pli-malpli oftajn terenglitadojn, la historio de la 20a jarcento la diversecon de la arbospecoj en la regiono, precipe sekve al la unua mondmilito. Per tiu okazo ni eksciis la devenon de la esprimo "Flandraj Ardenoj" kreita de Omer Wattez kaj Paul De Mont en 1888 ĝuste tie.

Posttagmeze, transpasinte la lingvan limon, ni marŝadis en Ellezelles, memproklamita naskiĝurbo de Hercule Poirot, sur la t.n. "pado de strangeco". Ĉi-foje ni troviĝis en la valonia "lando de montetoj", kaj laŭlonge de tiu pado ni povis admiri la verkojn de la artisto Paul Vandewattine (alinome Watkyne) inspiritajn de la mondo de la sorĉistinoj kaj de la inferaj kreitaĵoj.

Ni estis bonŝancaj ĝui tre agrablan tagon pro belega vetero ĝis la vespero. Sed, tuj kiam ni revenis en Francion, rekomenciĝis la pluvo.

*Redaktis: Daniel Mayeux*

# Enigma promenado en Bruĝo

La 1an de julio en Bruĝo. Kiel malkovri urbon, kiun oni jam konas? Dank' al la granda enigma ludo de la Bruĝa Esperanto-klubo!

Bart Demeyere konstruis longan promenadon kun du partoj. Unue la ĉ. 35 partoprenantoj ŝercis la ĝustan vojon per fotoj pri domdetaloj; kompreneble ne ĉiam facilis retrovi ilin. Aldone estis polica enketo: ni devis trovi indicojn rilate al la murdisto, la armilo kaj la loko de la krimo.

Pli interesis min la unua parto, kiu ebligis nin vere malkovri la tutan urbon. Ni marŝis dum pluraj horoj, pli ol 10 km, rigardante ĉiujn detalojn por trovi la taŭgan elementon. Ĝis tiam mi estis nur baza turisto en Bruĝo; escepte la plej grandajn vojojn kaj la boatpromenon, nenion mi konis. Mi ne konsciis, ke tiel belis la tuta urbo kaj ĉiuj stratoj, eĉ la malgrandaj, eĉ ekster la centro. Bruĝo estas arkitekture tre homogena urbo kaj vere entute mirinda urbo.

Kiel plezuriga kaj riĉa tago! Ni renkontiĝis kun pluraj konatoj el Antverpeno aŭ aliaj belgaj regionoj, kaj konatiĝis kun diversaj simpatiaj



belgaj esperantistoj.

Pluraj membroj el la Bruĝa klubo preparis bongustan veganan manĝon.

Finfine la plej lertaj enketintoj (preskaŭ ĉiuj!) ricevis etan premion... sed mi delonge forgesis la nomon de la krimulo!

*Redaktis: Anna Dupechaud*

# Dancado kaj flegado de Greziljono

Fine de aŭgusto okazis en Greziljono, la Esperanta kastelo apud Angers, semajno dediĉita al tradiciaj dancoj ĉefe el Francio kaj Eŭropo.

Kompreneble ĉiuj povis, krome aŭ anstataŭe, partopreni diversajn prelegojn, bele promeni en la ĉirkaŭaĵo aŭ pli for, tutsimple babili kun tre simpatiaj homoj... Ĉiumatene Esperanto-kursoj estis proponitaj. Verŝajne mi forgesas multajn aliajn programerojn.

La kastelo bezonas helpon, la mono ne tro alfluas... Do bonvenaj estis ĉiuj volontuloj por renovigi pordojn kaj fenestrojn, zorgi pri la multarba ĝardeno, ktp. Ĉiam io fareblas.

Ni trapasis belan, riĉan semajnon. Venontfoje, ankaŭ vi venu al Grezijono!




*Redaktis: Anna Dupechaud*


# Frandu la apudmaran Pikardion!

La Amiena Esperanto-klubo (Espéranto 80) ellaboris turisman libreton pri la apudmara Pikardio. Ĝi celas prezenti al la tutmonda esperantistaro plurajn trezorojn el la golfeto de la pikarda rivero Somme: mirindajn naturlokojn, belajn kaj historiajn konstruaĵojn, tipajn manĝaĵojn, ktp.

Ĝi estas elŝutebla el Interreto [klaku ĉi tie].

La Amiena klubo jam eldonis similan turismlibron pri la belaĵoj de la urbo Amieno okaze de la Lilla Universala Kongreso.




# Esperanto helpis la tandemon!

Pro la franca fervoja societo SNCF, kiu neatendite rifuzis transporti tandemon en trajno, kiu tamen akceptas biciklojn, du germanaj esperantistaj junulinoj eltrajniĝis en Lillo je malfrua horo, sen plano por ie tranokti. Pere de Pasport-Servano solvo aperis malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj: la tandemon ili devis lasi ĉe unua domo, tranokti en dua, kaj matenmanĝi en tria! La sekvantan tagon ili trame atingis Tourcoing. Ĉu Lillaj tramoj akceptas tandemon? Neniu scias, sed neniu forpelis ilin el la tramo kaj ili alvenis Germanion sen pliaj problemoj!



## KOLOFONO

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: **kuriero@esperanto-nord.org**